# Esperanto aktuell 285

43. Jahr (2024) №3 (285)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich




Ulrich Matthias kun du madagaskaraj esperantistinoj △. Interkultura Centro Herzberg: Eta kalejdoskopo de la Esperanto-Centro kaj de la Esperanto-urbo. Germana Esperanto-Asocio: Protokoll der Jahreshauptversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes. Renkontiĝoj en Germanio: Prezentado pri Afriko en Germanio. Publika agado: Esperanto-Informationsabend beim Rotary-Club Sindefingen. GEJ-Gazeto – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Hej GEJ-Gazeto-leganto! Raporto pri BRECO en Strasburgo. Raporto pri la 1-a Nurenberga GEJ-Renkontiĝo. La GEJ-Semajnfino en Berlino. Studenta vivo en Erlangen.

## Deutscher Esperanto-Bund e.V.
## Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
*www.esperanto.de/deb* (Netzpräsenz)

**Bankokonto** (por membrokotizoj kaj donacoj) / **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEF1ERB, Sparkasse Odenwaldkreis, DE 3250 8519 5200 4011 4571.
Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

**Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden**
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
Leitung: ***Elke Mondorf***
030 / 5106 2935, 0800 336 3636
Fax: 030 / 4193 5413
*gea.oficejo@esperanto.de*

**Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung**
DEB: 0800 - 3 36 36 36 – 21
DEJ: 0800 - 3 36 36 36 – 22

**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

## Estraro GEA / Vorstand DEB

**Netzpost** an / retmesaĝo al *gea.fe@esperanto.de*
Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form *vorname.name@esperanto.de*.

**Prezidanto / Vorsitzender**
***Martin Haase,*** Durchwahl: -5111
*gea.prezidanto@esperanto.de*

**Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender**
***Andreas Emmerich,*** Durchwahl: -5112

**Trezoristo / Kassenwart**
***Reinhard Pflüger,*** Durchwahl: -5113

**Sekretario / Schriftführer**
***Nils Brinkmann****, Durchwahl -5125*

**Administrado / Verwaltung**
***Jean-Paul Kuhfahl,*** *Durchwahl -5124*

**Membroadministrado/Mitgleiderverwaltung**
***Steffen Möller,*** *Durchwahl -21*

**Librokatalogo/Bücherkatalog**
***Barbara Brandenburg,*** *barbara.brandenburg@esperanto.de*

**Suborganizoj / Unterorganisationen / Erasmus+** ***Andreas Diemel,*** Durchwahl: -5114

**Informteknologioj/Informationstechnologie**
***Clemens Fries,*** Durchwahl: -5119

**Meza generacio / Mittlere Generation**
***Michaela Stegmaier:*** Durchwahl: -5126

**Jugendvertreter / Junulara reprezentanto**
***Jonas Schulz,*** Durchwahl: -5118

**Germana Esperanto-Junularo / Deutsche Esperanto-Jugend**
***Michael Vrazitulis,*** Durchwahl: -5211
*michael.vrazitulis@esperanto.de*

### Komisiitoj / Beauftragte

*esperanto.de/deb/beauftragte*

**Informteknologioj/Informationstechnologie**
Franz Kruse

**Gazetaraj kaj publikaj aferoj /Presse und Öffentlichkeitsarbeit**
***Louis von Wunsch-Rolshoven,***
Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112
*louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de*

**Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter für virtuelle Treffen** ***Heinz-Wilhelm Sprick,***
*gea.zoom@esperanto.de, tel. Durchwahl -5128*

**Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,**
Durchwahl -5123
***Uli Ender,*** *uli.ender@esperanto.de*

**Informmaterialo/Informationsmaterial**
Goar Engeländer, Durchwahl: -5127
*goar.engelaender@esperanto.de*

**Medienecho**
***Hermann Kroppenberg***, Durchwahl: -5121
*medienecho@esperanto.de*

**Libroservo / Bücherdienst**
D-ro / Dr. ***Wolfgang Schwanzer***,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl: -5122, *buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand*

**Komisiito Interreta Redaktado / Beauftragter Internetredaktion**
***Thomas Bormann,*** Durchwahl: -5117
*thomas.bormann@esperanto.de*

**Vertreter des DEB in der EEU-Versammlung/ Reprezentanto de GEA en la asembleo de EEU:** Jean-Paul Kuhfahl
Durchwahl: -5116
*jean-paul.kuhfahl@esperanto.de*

### Pliaj adresoj / Weitere Adressen

**Germana Esperanto-Junularo (GEJ) / Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412
*www.esperanto.de/gej* (Netzpräsenz)

**Interkultura Centro Herzberg (ICH) / Bildungszentrum des D.E.B.**
Komisiitoj/Beauftragte: ***Zsófia Kóródy*** (instruado), ***Peter Zilvar*** (klerigado kaj kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax), *ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich*

**Germana Esperanto-Instituto / Deutsches Esperanto-Institut**
***Ulrich Brandenburg***, Durchwahlen: -431 (Tel), -432 (Fax), *www.esperanto.de/dei*

**Germana Esperanto-Biblioteko / Deutsche Esperanto-Bibliothek**
p/a. ***Karl Heinz Schaeffer,*** Schulstr. 17, 73432 Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)
*biblioteko@esperanto-aalen.de*
*bibliothek-aalen@esperanto.de*
*www.esperanto.de/bibliothek*

**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung**
***Andreas Emmerich,*** *estraro@fame-stiftung.de* (nur por FAME)

**Stiftung Mondo**
Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,
030/6920 4846-1, *stiftungmondo@gmail.com,*
Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00.
Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

### Aŭstria Esperanto-Federacio / Österreichischer Esperanto-Verband

*aef@esperanto.at, www.esperanto.at*

**Esperantomuzeo Vieno / Esperantomuseum Wien**
Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien, +43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25, 1015 Wien, *plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm*

**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA**
**Germanio / Deutschland**
D-ro / Dr. ***Wolfgang Schwanzer***, Adressen siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst
**Aŭstrio / Österreich**
***Leopold Patek,*** Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg, Poŝtel. +43/66473611289, *aon.913548977@aon.at*

***Esperanto aktuell***
ISSN 0942-024 X

**Eldonisto / Herausgeber**
Deutscher Esperanto-Bund e.V.,
der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

**Redaktista teamo / Redaktion:**
*ea@esperanto.de****; Stano Marček*** (Martin/ Slovakio), ***Yashovardhan Singh***, Im Johannistal 23, 42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

**Kunlaborantoj / feste Beiträger:**
***Aŭstria Esperanto-Federacio***
***Hermann Kroppenberg*** (Medienecho),
***Utho Maier*** (Bibliotheken), ***Peter Zilvar*** (ICH)

**Presejo / Druck:** Alfaprint, Martin, Slovakio

*Esperanto aktuell* kun *GEI-gazeto* havas ses numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo (vidu maldekstre supre) por 19 € (de eksterlando: 25 €) jare.

*Esperanto aktuell* mit *GEI-gazeto* erscheint sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 € (Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche Mitglieder im Beitrag enthalten.

**Anoncoj / Anzeigen:**
Skribu al / Schreiben Sie an: *deb@esperanto.de*

**Kontribuoj / Beiträge**
Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc a.s.) al *ea@esperanto.de*, por n-ro 2024/4 ĝis la 15-a de Julio 2024. Paperaj kontribuoj nur esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format *.doc o.ä.) an *ea@esperanto.de*, für Nr. 2024/4 bis zum 15. Juli 2024. Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann an Yashovardhan Singh (s.o.).



# Karaj legantoj,

mi ĵus revenis de la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo. Ĝi estis tre bela aranĝo, al kies sukceso certe kontribuis la profesinivela organizado de niaj francaj kolegoj, sed ankaŭ la bela vetero kaj la interesa eŭropa urbo Strasburgo. Vi trovos en ĉi tiu numero la protokolon de la jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio. Raporto pri la kongreso sekvos en la venonta numero. En la estraron eniris Clemens Fries, kiu prizorgos la fakon informteknologioj, kaj ni adiaŭas nian multjaran estraranon Franz Kruse. Franz kreis la nun uzatan informteknologian strukturon kaj tiel plenumis gigantan laboron. Koran dankon, Franz! Ni esperas, ke vi ankoraŭ dum longa tempo kunagos fone!

Por esti aktiva en nia movado, ne necesas esti estrarano. Por pligrandigi la nombron de aktivuloj, kiuj povas transpreni ankaŭ malgrandan taskon, ni volas ŝanĝi la karakteron de nia "asocia konsilantaro" al aktivula semajnfino, en kiu oni aktiviĝos pri konkretaj taskoj anstataŭ raporti pri pasinta agado. Tiuj raportoj havas sian lokon en *Esperanto aktuell*. Se vi volas aktiviĝi, jam rezervu la unuan semajnfinon de novembro, kiam ni kunvenos aktivule en Göttingen.

Multaj el vi rimarkis la reklam-kampanjon de la japana entreprenisto kaj esperantisto Etsuo Mijoŝi (ofte transliterata: *Miyoshi*), kiu publikigis dum multaj jaroj grandformatajn anoncojn en grandaj gazetoj, inter alie en Germanio. Sekve al tiu agado, li sendis leteron kun informmaterialo al parlamentanoj en kelkaj eŭropaj landoj, kunlabore kun la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio Seán Ó Riain kaj ankaŭ kunlabore kun la landaj asocioj en Aŭstrio kaj Germanio. Kiel atendite en jaro de eŭropaj balotoj, pluraj alskribitaj personoj reagis – plejparte pozitive. Ni nuntempe respondas al la reagintoj. Tiun laboron prizorgas Lu Wunsch-Rolshoven. Ni raportos pri la kampanjo en unu el la venontaj numeroj de *Esperanto aktuell*.

Dum la inaŭguro de la Eŭropa Esperanto-Kongreso, Seán Ó Riain citis el studo, kiu konstatis, ke post 1500 horoj da lernado de la angla nur 1% de la lernintoj atingas la nivelon C1 laŭ la komuna eŭropa referenckadro pri lingvokono.

Sed kiel estas en Esperanto? Mi demandis en la kongresa babilejo de la aplikaĵo Telegram, kiom alta la partoprenantoj taksas sian konon de Esperanto laŭ tiu sistemo. Preskaŭ tri kvaronoj de la respondintoj taksas sian lingvokonon je C1 aŭ pli alta. Eĉ se kelkaj supertaksas sian konon, kompare evidentiĝas, ke Esperanto estas pli taŭga rimedo por internacia komunikado ol la angla, kiam temas pri nuancita interŝanĝo pri profundaj ideoj. Kiel helplingvo pri simplaj temoj sufiĉu la angla (je malalta nivelo); kiel lingvo por altnivela komunikado pli taŭgas Esperanto.

La kutiman argumenton kontraŭ Esperanto, ke ĝi estas lingvo por eŭropanoj, ni povas refuti, atentigante pri la venonta Universala Kongreso en Tanzanio.

Oni petis min ĉi tie alvoki por programkontribuoj: Se vi jam vojaĝos al Afriko, konsideru kontribui al la kongresa programo. Simple kontaktu la kongresorganizantojn kiel eble plej baldaŭ!

Se vi mem ne estas tiom vojaĝemaj, venigu Esperanton al via hejmo! Nia komisiito pri rondvojaĝoj Uli Ender el Munkeno denove organizas vojaĝojn de lertaj Esperanto-parolantoj tra Germanio. Inter tiuj ankaŭ troviĝas du junaj volontuloj, kiuj dum tiuj ĉi somero kaj aŭtuno subtenos nian movadon. Ili volonte vizitos diversajn Esperanto-grupojn tra la lando kaj povas prelegi pri siaj spertoj, sed ankaŭ subteni vin ĉe informstando aŭ Esperanto-kurso.

Mi deziras al vi bonan legadon kaj esperas revidi vin en la somera Esperantujo!

**Martin Haase**

# Enhavtabelo/Inhalt

**1:** UlrichMatthias kun madagaskaraj esperantistinoj (paĝo 21).
**2: Adresoj.**
**3: Germana Esperanto-Asocio:** Karaj legantoj. Enhavtabelo.
**4: Interkultura Centro Herzberg:** Eta kalejdoskopo de la Esperanto-Centro kaj de la Esperanto-urbo.
**5: Aŭstria Esperanto-Federacio:** Kiamaniere protokoli ŝakludojn.
**6-7: Germana Esperanto-Asocio:** Protokoll der Jahreshauptversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes 11.05.2024.
**8-11: Renkontiĝoj en Germanio:** Prezentado pri Afriko en Germanio. NEMO. PSI fariĝis 40-a! FAME-fondaĵo. FAME-Stiftung.
**12: Publika agado:** Esperanto-Informationsabend beim Rotary-Club Sindelfingen.
**13-14: Medienecho.**
**15: El bibliotekoj kaj arkivoj:** Wer sucht, der hofft zu finden.
**16: Nekrologoj:** Heinz Dieter Maas. Uwe-Joachim Moritz.
**17-18: Rilate al Afriko:** VUDUO.
**19: Rilate al libroj:** La pentrista vivo de Helga Plötner. Dirite ne signifas farite.
**20-24: Pri vojaĝoj:** La 24-a Israela Kongreso de Esperanto. Limburga Tago en Gruitrode. Mit Esperanto in Madagaskar. Trajnvojaĝo tra Japanio. Rainer Kurz vizitis Ŝanhajon.
**25-30: GEJ-Gazeto** – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Hej GEJ-Gazeto-leganto! Raporto pri BRECO en Strasburgo (Majo 2024). Mia unua sperto en Esperantujo dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso. Raporto pri la 1-a Nurenberga GEJ-Renkontiĝo. La GEJ-Semajnfino en Berlino (Aprilo 2024). Europäische Reiseziele für Esperanto-Interessierte. Studenta vivo en Erlangen.
**30: Nekrologo:** Norbert Karbe
**Aranĝoj:** Spontanea kunveno en Frankfurto/Majno.
**31: Kalendaro.**

# Eta kalejdoskopo de la Esperanto-Centro kaj de la Esperanto-urbo

## Jubilea eldono de *Harca Esperanto-Kuriero* (HEK)

Pretiĝis nia 200-a numero! Antaŭ nelonge ni transsendis ĝin kun riĉa enhavo al multaj homoj. Se vi ne ricevis ĝin, bv. kontakti nin, volonte ni transsendos ĝin al via aktuala loĝadreso. Sur la frontpaĝo de nia jubilea numero vi povas vidi belan, multkoloran emblemon de "Herzberg am Harz... la Esperanto-urbo". Ĝin kaj alian karakterizan Herzberg-emblemon pretigis grafikisto de la urbo kaj ni ricevis uzrajton de la loka administracio.

## Vizitoj, gastoj

– Pli ol dudekkapa delegacio el Ĉinio vizitis Herzberg por traktadi pri estontaj komunaj projektoj per Esperanto en la Esperanto-urbo dum la venontaj jaroj. Ni ĝojas, ke aktivaj ĉinaj Esperanto-fakuloj estas tiom malfermitaj rilate al praktikaj utiligoj de Esperanto.

– Subite anoncis sin ĉe ni kvin universitataj studentinoj el Danlando, kiuj studas interkulturan sciencon. Ili dubis pri la rapida lerneblo de Esperanto, do volis testi, lerni ĝin. Ili miris kaj ĝojis, ke ekzistas jam eĉ Esperanto-urbo, do ili venis viziti ĝin kaj petis nin je intervjuo. Ili ricevis stipendion por veturado kaj kelktaga restado, post kio ili devas verki 50-paĝan fakeseon pri Esperanto kaj la Esperanto-urbo Herzberg am Harz.

## Publika agado

– Fine de Aprilo ni starigis informpavilonon okaze de la printempa festo en najbara Juesholz-strato, sub florantaj pomarboj. Ni disdonis multajn flugfoliojn, informis la interesiĝantojn pri la lingvo, pri ĝia internacia uzeblo kaj invitis ilin al niaj baldaŭaj someraj kaj aŭtunaj Esperanto-kursoj. Ni allogis preterpasantojn per prezentado de belaj Esperanto-libroj, al infanoj ofertis paper-faldadon kaj pretigon de kvin-pintaj verdaj steloj. Denove kun ĝojo ni konstatis, ke neniu kritikis Esperanton, do evidente ni atingis post plurjardeka agado, ke lernado de la internacia lingvo kaj okupiĝo pri ĝi apartenas al la normala socia kulturformo.



**La informpavilono en la Juesholz-strato.**

## Informado, varbado

- Estas lanĉita nia novstrukturita hejmpaĝo *http://esperanto-urbo.de*, kiun ni prilaboradas, ampleksigas paŝon post paŝo. Jam estas konsultebla la Programkalendaro 2024, legeblas alvokoj al lingvokursoj kaj klerigseminarioj, trejnado de Esperanto-fakuloj, troveblas informoj pri la Esperanto-Centro kaj biblioteko, pri multaj Esperanto-atingaĵoj, Esperanto-vidindaĵoj en la urbo. Baldaŭ ni prilaboros ankaŭ la germanlingvajn paĝojn.

## Kursoj, klerigado

VHS Berlin/Pankow petis nin gvidi perretan informvesperon, enkondukan Esperanto-kurson al interesiĝantoj, komencantoj. Ni volonte plenumis tiun taskon. La prezentado far Zsófia Kóródy allogis dekojn da partoprenantoj.

Jen la sekvaj VHS-kurshoroj en la aŭtuna semestro:

- 23.09.2024, 19:00 - 20:30 (lundo): *https://www.vhsit.berlin.de/VHSKURSE/BusinessPages/CourseDetail.aspx?id=719699*
- 27.11.2024, 19:00 - 20:30 (merkredo): *https://www.vhsit.berlin.de/VHSKURSE/BusinessPages/CourseDetail.aspx?id=719701*

Kursofertoj de Esperanto-Centro Herzberg: *https://esperanto-urbo.de/programkalendaro/*

- someraj intensaj kursoj: 05-13 kaj 13-21 julio, 03-10. aŭgusto 2024
- aŭtuna semajnfina kurso 15-17. novembro 2024

Klerigado, fakseminarioj: *https://esperanto-urbo.de/alvokoj/*

- trejnsesioj: 03-06. oktobro 2024: Torpedo-19, pedagogiaj tagoj, 13-15. decembro: Studsemajnfino

Kondiĉoj pri partopreno en klerigado: *https://esperanto-urbo.de/ich/gea/*

## Subteno estas bezonata

Por la multaj Esperanto-taskoj en Herzberg, respektive por la Esperanto-asocio, nepre estas bezonataj pluraj aktivuloj. Helpemaj kunkonstruantoj kaj samcelanoj estas tre bonvenaj. Kune ni estos pli fortaj kaj povos sukcesi post kvindekjara dura laborego. Peter Zilvar restas laboregema optimisto kaj certe ankoraŭ ekzistas Esperanto-idealistoj, eble el aliaj landoj. Vizitu nin, restadu por certa tempo aŭ laŭ interkonsento eĉ je daŭro!

Bv. kontakti la EGS-prezidanton Peter Zilvar (*zilvar@t-online.de*).

Dankon!





# Kiamaniere protokoli ŝakludojn




**En la jaro 1590 en Romo la itala pastro Lorenzo Busnardo ŝakludis. Li venkis post 14 movoj.**

Nuntempe, neniu plu konas la oponanton. Sed oni bone konas la movojn de la tiama ludopartio. Kiamaniere tiam la movoj estis notitaj?

Ekzemple movo 7 en nuntempa notado aspektas tiel: *7. Kc1-g5 f7-f6*. (K estas notado por kuriero kaj ankaŭ povas esti anstataŭita per la simbolo♗.) Tio signifas, ke de la blankaj figuretoj la *kuriero* ♗ de kampo c1 iras al kampo g5, kaj de la nigraj figuretoj la *peono* de kampo f7 iras al f6.

Ĉar miskomprenoj en tiu kazo ne eblas, oni eĉ povas forigi la indikon pri la starto kaj povas pli-mallongigi al: 7.♗g5 f6.

Sed tiutempe, en la jaro 1590, neniu havis la ideon, doni koordinatojn a, b, …, h al la kolonoj kaj 1, 2, …, 8 al la linioj de la tabulo. Tio estis multe pli posta invento. Do la tiutempa protokolo aspektis simile al rakontoj kiel tio: „Movo 7: Blanko movas sian neevoluitan kurieron al la regiono de la nigra *reĝa ĉevalo* por ke ĝi ataku la *damon*."





◁ **Busnardo 1590, Movo 7, blanka figureto** (*https://www.chessgames.com/perl/chessgame?gid=1259664*)

La prozaj priskriboj certe estis malfacile legeblaj kaj entenis grandan riskon de miskomprenoj.

En la jaro 1737 s-ro Philipp Stamma menciis la tiel nomitan „algebran notadon", kiun ni nuntempe plejparte uzas. Sed dum tiu tempo jam estis aperintaj pluraj aliaj sistemoj por notado.

Ekzemple ekzistis sistemoj, kiuj markis la 64 kampojn per nombroj 1, 2, …, 64. Ekzistis pluraj variantoj, distingiĝante, en kiu angulo la nombrado komenciĝis kaj ĉu ĝi unue daŭrigis horizontala aŭ vertikala.

Aliaj sistemoj uzis nur ciferojn: 1, 2, …, 8 por la kolonoj, 1, 2, …, 8 por la linioj. Denove aliaj sistemoj uzis la literojn A, B, …, H por la kolonoj, la literojn k, l, …, r por la linioj.




◁ **Nomoj de la kampoj laŭ la moderna algebra notado. (Fonto: Vikipedio)**

Vaste uzita ankaŭ estis la „priskriba notado". Ĝi estis ĉefe uzita en Britio. En Francio kaj Hispanio oni uzis similan sistemon. Ĝi uzas ciferojn por distingi inter la linioj, same kiel la algebra notado. Sed la kolonoj estas unu- aŭ du-literaj. Krome la sistemo rilatas al la vidpunkto, ĉu de flanko de Blanko aŭ de Nigro. La kampo, kiu el vidpunkto de Blanko estas K6, el vidpunkto de Nigro estas K3.

Ĝi estis uzita ĝis la 1980-aj jaroj, do ĝis antaŭ 40 jaroj. Nur ekde tiam Britio ŝanĝis al la algebra notado, kiu estas pli simpla, mallonga kaj malpli miskomprenebla.

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| QR1 QR8 | QN1 QN8 | QB1 QB8 | Q1 Q8 | K1 K8 | KB1 KB8 | KN1 KN8 | KR1 KR8 |
| QR2 QR7 | QN2 QN7 | QB2 QB7 | Q2 Q7 | K2 K7 | KB2 KB7 | KN2 KN7 | KR2 KR7 |
| QR3 QR6 | QN3 QN6 | QB3 QB6 | Q3 Q6 | K3 K6 | KB3 KB6 | KN3 KN6 | KR3 KR6 |
| QR4 QR5 | QN4 QN5 | QB4 QB5 | Q4 Q5 | K4 K5 | KB4 KB5 | KN4 KN5 | KR4 KR5 |
| QR5 QR4 | QN5 QN4 | QB5 QB4 | Q5 Q4 | K5 K4 | KB5 KB4 | KN5 KN4 | KR5 KR4 |
| QR6 QR3 | QN6 QN3 | QB6 QB3 | Q6 Q3 | K6 K3 | KB6 KB3 | KN6 KN3 | KR6 KR3 |
| QR7 QR2 | QN7 QN2 | QB7 QB2 | Q7 Q2 | K7 K2 | KB7 KB2 | KN7 KN2 | KR7 KR2 |
| QR8 QR1 | QN8 QN1 | QB8 QB1 | Q8 Q1 | K8 K1 | KB8 KB1 | KN8 KN1 | KR8 KR1 |

◁ **Nomoj de la kampoj laŭ brita priskriba notado. (Fonto: Vikipedio)**

**Do, daŭris jarcentojn, ĝis kiam homoj decidis, uzi la pli simplan sistemon. Ĉu Esperanto havos similan sorton?**

[1] La movoj de la ŝakludo de Lorenzo Busnardo 1590 en nuntempa notado:

1.e4 e5 2.♘f3 ♘c6 3.♗c4 ♗c5 4.c3 ♕e7 5.O-O d6 6.d4♗ ♗6 7.♗g5 f6

8.♗h4 g5 9.♘xg5 fxg5 10.♕h5+ ♔d7 11.♗xg5 ♕g7 12.♗e6+ ♔xe6

13.♕e8+ ♘ge7 14.d5#1-0

Komparu *https://www.chessgames.com/perl/chessgame?gid=1259664*.

[2] Priskriba notado (germanlingve): *https://de.wikipedia.org/wiki/Schachnotation#Beschreibende_Notation*

[3] Antonius van der Linde: Geschichte und Litteratur des Schachspiels. 2: *https://www.digitale-sammlungen.de/de/view/bsb11184014*

[4] Notation Must Die: The Battle For How We Read Music *https://youtu.be/Eq3bUFgEcb4*

La komenca parto estas pri la historio de ŝakluda notado (anglalingve)

2024-03-11 **Alfred Heiligenbrunner**

# Protokoll der Jahreshauptversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes 11.05.2024

**Universität Strasbourg, Gebäude La Patio, 22 rue René Descartes, 67000 Strasbourg, Amphithéâtre 3**

**Anwesende Stimmberechtigte: 53 Mitglieder sowie 6 Gäste**



Vom Vorstand waren anwesend: Martin Haase, Andreas Emmerich, Reinhard Pflüger (bis einschließlich Punkt 6), Michaela Stegmaier, Franz Kruse (Vorstandsmitglied bis Punkt 4), Clemens Fries (Vorstandsmitglied ab Punkt 4), Andreas Diemel. Nils Brinkmann, Jean-Paul Kuhfahl und Jonas Schulz fehlen entschuldigt.

**1. Eröffnung**

Der Vorsitzende eröffnet um 09:14 Uhr die Versammlung und begrüßt die Anwesenden. Martin Haase verweist auf die Einladung in Esperanto aktuell 01/2024 und stellt fest, dass die Mitgliederversammlung beschlussfähig ist. Dagegen erhebt sich kein Widerspruch.

Die Tagesordnung wird über einen Beamer auf einer Leinwand dargestellt. Die Tagesordnung wird einstimmig von der Mitgliederversammlung angenommen.

Martin Haase schlägt Deutsch als Sitzungssprache vor. Dies wird einstimmig angenommen.

Als Protokollführer wird Jochen Wagner vorgeschlagen. Jochen Wagner wird einstimmig zum Protokollführer gewählt.

Versammlungsleiter für TOP 3 und 4: Versammlungsleitung bleibt beim Vorsitzenden (da dieser nicht selbst neu gewählt wird): Zustimmung der Versammlung

Das Protokoll der letzten Bundesversammlung wurde in Esperanto aktuell abgedruckt. Martin Haase lässt über die Annahme des Protokolles abstimmen. Dem Protokoll wird mit 2 Enthaltungen zugestimmt.

Martin Haase liest die Namen der Verstorbenen seit der letzten Jahreshauptversammlung vor. Die Anwesenden erheben sich zum Gedenken der ehemaligen Mitglieder.

**2. Bericht der Bundesorgane**

**a. Bericht des Vorstands**

Tätigkeitsbericht des Vorstandes, der Vorsitzende trägt die Aktivitäten aus jedem der einzelnen Vorstandsbereiche kurz vor und verweist darüber hinaus auf die Veröffentlichung in *Esperanto aktuell* 02/2024.

- ◆ Tätigkeitsbericht
  - o Bundesversammlung hat in Braunschweig stattgefunden. Das Protokoll der Versammlung wurde in Esperanto aktuell abgedruckt.
  - o Der Verbandsrat hat am 4.11.2023 in Herzberg getagt.
  - o Seit der vergangenen Bundesversammlung haben sich die Vorstandsmitglieder viermal persönlich getroffen.
  - o Weitere Treffen fanden (etwa im monatlichen Rhythmus) über Zoom statt
- ◆ Mitgliederverwaltung
  - o Es gibt mehr Eintritte als Austritte
  - o Aufgrund der Todesfälle ist jedoch die Mitgliederzahl auf 599 gesunken
- ◆ Büro Katzbachstraße
  - o Das Büro in der Katzbachstraße 25 in Berlin soll weiterhin als Bundesgeschäftsstelle genutzt werden, der Mietvertrag soll verlängert werden. Es gab eine Mieterhöhung von 1 Euro pro Quadratmeter im Monat
- ◆ Informationstechnologie
  - o Sitzungs-Protokolle können nun online abgerufen werden.
  - o Esperanto aktuell ist nun im Internet und in einer Version für Blinde verfügbar
  - o Franz Kruse und Clemens Fries kümmern sich um die IT-Infrastruktur.
- ◆ Veranstaltungen. Folgende Veranstaltungen haben stattgefunden:
  - o Jahreshauptversammlung in Braunschweig
  - o Ostertreffen PSI
  - o Herbstwanderung
  - o Silvestertreffen Luminesk‘
  - o Online-Treffen
- ◆ Weiterbildung (Peter Zilvar und Zsófia Kóródy) aus Herzberg
- ◆ Erasmus+: Leider hat der DEB keine Akkreditierung für eine dauerhafte Förderung erhalten. Der DEB kann jedoch die Förderung einzelner Projekte beantragen.
- ◆ Presse: Lu Wunsch Rolshofen berichtet über die Aktivitäten. Im Vorfeld des Kongresses trat er mit den Medien in Kontakt, wie z.B. dem SWR. Eine intensive Presseberichterstattung über Veranstaltungen ist jedoch weiterhin schwierig zu erreichen, einzelne Medien konzentrieren sich vorrangig auf ihr Verbreitungsgebiet und nicht auf das benachbarte Ausland
- ◆ Ortsgruppen, Landes- und Fachverbände: zuständig ist Andreas Diemel
- ◆ Verbandszeitschrift Esperanto aktuell. Sie wird nun komplett in Farbe gedruckt und ist auch online als PDF und in einer Version für Blinde verfügbar.
- ◆ Deutsche Esperanto Jugend
- ◆ Übergang Deutsche Esperanto-Jugend zum Deutschen Esperanto-Bund
  - o Übergang von DEJ zur DEB fällt vielen Leuten schwer
  - o Viele beenden ihre Mitgliedschaft nach dem Verlassen der DEJ
  - o Michaela Stegmaier organisiert NEMO, welches gezielt Neumitglieder im DEB ansprechen soll
- ◆ Deutsche Esperanto-Bibliothek in Aalen. Diese berichtet regelmäßig in Esperanto aktuell über ihre Aktivitäten

**b) Bericht des Schatzmeisters**

Der Schatzmeister verweist auf den Bericht in Esperanto aktuell 02/2024 und ergänzt diesen um folgende Zahlen.

Summen:

- Budget 2023: -12.590 €
- tatsächliches Ergebnis: 52.939,55 €
- Budget 2024: -15.344 €
- Budgetentwurf 2025: -18.574 €

Der gute finanzielle Abschluss ist insbesondere durch eine Erbschaft von ca. 34.000 € und Einnahmen für Folgejahre von ca. 30.000 €, denen nur ca. 13.000 € Einnahmen aus Vorjahren für 2023 gegenüberstehen, zustande gekommen.

Ohne Erbschaft und jahresbereinigt beträgt das Plus ungefähr 1800 Euro.

**c) Bericht der Rechnungsprüfer**
(Reinhard Fößmeier und Stefan Krieghoff)

Reinhard Fößmeier berichtet über die Kassenprüfung und verweist auf den Bericht in Esperanto aktuell 02/2024. Es wurden keine Anlässe zur Beanstandung gefunden. Die Rechnungsprüfer empfehlen, den Vorstand für 2023 zu entlasten.

**3. Entlastung des Vorstandes**

Es wird der Antrag gestellt, den Vorstand zu entlasten. Der Antrag wird einstimmig angenommen, ohne Gegenstimmung und bei Enthaltung der Betroffenen.

**4. Wahl zu Bundesorganen**

**a) Wahl eines weiteren Vorstandsmitgliedes**

Franz Kruse möchte aus dem Vorstand der DEB ausscheiden. Clemens Fries wird als Nachfolger für den IT-Bereich vorgeschlagen. Clemens Fries stellt sich und seine Tätigkeiten im IT-Umfeld vor. Clemens Fries wird einstimmig gewählt, enthält sich jedoch selbst.

**b) Wahl eines weiteren Rechnungsprüfers**

Georg Hennemann erklärt sich bereit, das Amt des Rechnungsprüfers zu übernehmen. Bei zwei Enthaltungen wird er einstimmig gewählt.

**5. Haushaltsplan 2024**

Der Schatzmeister stellt den Haushaltsplan vor, der auch in Esperanto aktuell 02/2024 abgedruckt ist. Es ist das Ziel, für das Jahr 2024 einen ausgeglichenen Haushalt zu haben.

Die Versammlung nimmt diesen Haushaltsplan einstimmig an.

**6. Behandlung von Anträgen**

Es wurden keine Anträge gestellt.

**7. Ort und Zeit der Bundesversammlung 2025**

Der Vorsitzende stellt die Überlegungen für den gemeinsamen Kongress mit dem wallonischen Verband (Espéranto Wallonie) vor, über das lange Wochenende Anfang Oktober 2025 in der Jugendherberge in Schleiden zu tagen. Die Jahreshauptversammlung soll am 4. 10. 2025 im Rahmen des gemeinsamen Kongresses stattfinden.

Die Bundesversammlung nimmt diesen Vorschlag einstimmig an.

**8. Verschiedenes**

◆ Andreas Emmerich stellt strategische Überlegungen über die Bundesgeschäftsstelle vor. Er weist zudem auf die Möglichkeit hin, den DEB als Erben zu bedenken. Mittelfristig soll jedoch die Geschäftsstelle in der Katzbachstraße beibehalten werden.

◆ Werner Groen (Blindenverband EBLOGO) bedankt sich für die gute Zusammenarbeit zwischen seinem Verband und dem DEB.

◆ Peter Zilvar stellt die Aktivitäten in der Esperanto-Stadt Herzberg am Harz vor.

◆ Guido Brandenburg (Esperanto-Eisenbahner GEFA) lobt die Zusammenarbeit und erwähnt insbesondere die Verbesserung im IT-Bereich in der letzten Vorstandsperiode.

Martin Haase beendet die Jahreshauptversammlung um 10:20 Uhr. Protokollführer Jochen Wagner



Germana Esperanto-Asocio / Deutscher Esperanto-Bund

# Prezentado pri Afriko en Germanio

**Post mia alveno al Germanio mi gastiĝis en Brombachtal ĉe Andreas Emmerich, la vicprezidanto de GEA, kaj en Munkeno ĉe Uli Ender, la komisiito pri rondvojaĝoj en Germanio.**

Mi prelegis en la Munkena klubo pri la festotagoj en Afriko kaj respondis la demandojn de la partoprenintoj, ne nur pri la ĉeftemo sed ankaŭ pri diversaĵoj rilate Afrikon. Antaŭ ol daŭrigi la rondvojaĝon mi vizitis la Esperanto-placon, la muzeon kaj la placon de Olimpikaj Ludoj.

Profitante la paskan periodon mi partoprenis la 40-an Printempan Semajnon Internacian (PSI) en Bayreuth, Germanio, kie partoprenis 83 esperantistoj el diversaj kontinentoj.

Dum la evento mi trifoje prelegis respektive pri la festotagoj en Afriko, la tiea eduksistemo kaj pri la Esperanto- movado en okcidenta Afriko. Mi ricevis multajn demandojn, kiujn mi diligente respondis, ne forgesante mencii la okazigon de la unua UK en Aruŝo, Tanzanio. Mi senĉese laboras por helpi la organizadon de la UK. Je la solena fermo mi faris belan reklamon pri la unua UK en Afriko kaj petis la kontribuon de ĉiuj por la sukcesigo de la unua Universala Kongreso sur la afrika kontinento. Mi partoprenis ankaŭ kelkajn programerojn: la babilrondon de Alex Humet, la kartludadon, la ekskursojn kaj la agadon de EDE.

Post la adiaŭo, mi komencis la duan parton de mia prelegvojaĝo. Unue mi estis ĉe la geedza paro Petra kaj Ralf Dückershoff en Bochum. Mi tre bone fartis ĉe ili, kvazaŭ mi estus en mia propra familio en Benino. Ekde tiam la vetero ege influis min ĉar la temperaturo estis ege malalta kompare al tiu de Afriko. La geedza paro, Petra kaj Ralf



En Munkeno.



Kun Zsofia Korody en Herzberg.

petis min partopreni la lingvan renkontiĝon, kiu ĝenerale okazas ĉiun merkredon en Essen. Tie mi renkontis la duan fojon Andreas Diemel. En tiu lingva babilejo unu el la temoj estis la UK en Afriko. Estis tre interese kaj amuze tie. Post tri noktoj en Bochum mi veturis al Hamburgo, kie mi prelegis en la Hamburga Esperanto-klubo pri la samaj tri temoj. Mi havis iom da tempo por viziti la havenon kaj parton de la urbo. Gerald Roemer kaj lia edzino estis afablaj kaj ĉarmaj gastigantoj. Malgraŭ la aĝo, Gerald estas fizike pli aktiva ol François.

Post Hamburgo sekvis restado en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. Mi estis salutita kaj sentis min honorigita per la hisitaj benina kaj Esperanto-flagoj antaŭ la Esperanto-Centro, kie mi estis gastigita. Zsófia Kóródy kaj nova klubanino Claudia montris al mi diversajn publikajn lokojn, kie Esperanto estas bone videbla. Tre belegaj laboroj pri Esperanto estas okazantaj en la urbo. Kun pluraj klubanoj kaj Esperanto-amikoj mi partoprenis la inaŭguron de nova Esperanto-benko en bela urba parko. Partoprenis la etan ceremonion Christopher Wagner, la urbestro de Herzberg, Andreas Emmerich, la vicprezidanto de GEA, repezentanto de la regiona gazeto Harzkurier kaj membroj de loka asocio Harzklub, kiuj pretigis la belan lignan Esperanto-benkon. Ĝi fariĝos nova daŭripova reklamilo por Esperanto en la urbo. Mi gratulis kaj dankis Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar pro la faritaj agadoj pri Esperanto






Kun la hamburgaj klubanoj.

en Esperantujo. Bonŝance estis varma kaj sunbrila vetero. En la sama tago, posttagmeze mi prelegis en la ĝardena pavilono de la Esperanto-Centro pri la afrika kulturo, la eduksistemo kaj festotagoj. Multaj admiris Afrikon kaj ŝatus iam viziti ĝin.

La nelacigebla esperantisto, la vicprezidanto de GEA - kiel kutime - veturigis min el Herzberg al Brombachtal, kie mi denove estis gasto. Tie mi iom klarigis pri Afriko nur por apogi la rakonton de Andreas al la familio. Andreas jam estis en Senegalo dum la okazinta Afrika Kongreso. Mi revenis al Darmstadt helpe de Andreas kaj tie mi gastiĝis ĉe la geedza paro Detlef Haußner kaj Susanne Warmuth. Detlef pezentis min al Maria Merla kaj Annsibyll. Ili organizis urborigardadon kaj vespere okazis renkontiĝo. Mi prezentis filmojn kaj bildojn pri Afriko al la klubanoj post la vespermanĝo. Estis tre tre agrabla babilado. Detlef donacis plurajn librojn, kiujn mi kunportis al Afriko.

La nun okazinta vojaĝo ege impresis min. En Afriko la movado kuŝas en la manoj de la junularo kaj inverse estas en Eŭropo. La plej agademaj aktivuloj estas la maljunuloj kun jaraĝo de 60+. La kunvivado, kunagado rimarkeblas inter la aktivuloj.

Mi konkludis, ke la sukceso de la vojaĝo dependis de GEA. Notindas danki al Uli Ender, Martin Haase,


Kun la grupo en Essen.


Prelegante en Hamburgo.

Ralf Haumer kaj Andreas Emmerich, kiuj dediĉis sian tutan tempon por sukcesigi la projekton. Andreas estas nelacigebla homo en Esperantujo.

Apartan dankon al Tuomo Grundström kaj Nicola Ruggiero, kiuj distance subtenis la realigon de la vojaĝo.

**François Hounsounou**
benina esperantisto el Lokossa.

# NEMO

**Inter la 17-a kaj la 20-a de Majo 2024 okazis la unua NEMO (Novula Esperanta Mezaĝula Okazaĵo). La celo estis okazigi renkontiĝon kiu bonvenigu novulojn de meza aĝo en la movado. Por tio ĝis nun iom mankis taŭga renkontiĝo.**

La celo estis okazigi renkontiĝon kiu bonvenigu novulojn de meza aĝo en la movado. Por tio ĝis nun iom mankis taŭga renkontiĝo.

La renkontiĝo okazis en la Esperanto-stacio en Halbe, sude de Berlino, kiu pro la trajnstacio rekte antaŭ la domo estis perfekte atingebla, kaj ankaŭ tre taŭga por nia grupgrandeco de 12 homoj. Proksimume la duono estis komencantoj/komencintoj, la ceteraj estis progresintoj kaj iom pli spertaj esperantistoj.

Ni mem decidis pri nia programo. Okazis lingvokursetoj laŭ la diversaj niveloj de la novuloj, kaj ni ornamis multajn


La partoprenantoj de NEMO.

objektojn en la Esperanto-stacio per esperantlingvaj etikedoj. Ralf, la fondinto de la Esperanto-stacio, montris al ni la vilaĝon kaj rakontis pri ĝia interesega historio. Aliaj programeroj estis la uzado de modernaj virtual-realec-okulvitroj por sendanĝerigi bombojn, promenadoj en la vilaĝo, naĝado en la ankoraŭ iomete malvarma lago kaj ludado de tabulludoj. Ankaŭ niajn manĝaĵojn ni mem kuiris helpante unu la aliajn.

La plej grava programero eble estis la babilado pri diversaj (proksimaj kaj malpli proksimaj) Esperanto-renkontiĝoj, kiuj povus esti interesaj por la partoprenantoj.

Koran dankon al Petra, kiu ĉeforganizis la unuan NEMOn.

La plano por la dua NEMO estas bonvenigi ankaŭ homojn kun infanoj. La datoj kaj loko estas ankoraŭ decidotaj.

**Carolin Weemeyer**

# PSI fariĝis 40-a!

## La Printempa Semajno Internacia festis sian „malgrandan jubileon“ en la moderna junulargastejo Bayreuth, Supra Frankonio.




Entute venis 83 partoprenantoj por komune travivi agrablajn tagojn en Esperanto-medio kaj festi Paskon. Por tiu ĉi fojo la organiza teamo denove elpensis ampleksan kaj buntan programon kun eĉ du koncertoj, unu de Kaŝi kaj unu de Jonny M!

La bezono de Esperanto-kursoj kaj por komencantoj kaj por progresantoj montriĝis ĉe multnombraj partoprenantoj. La nove akiritajn sciojn oni tuj povis apliki dum diverstemaj paroligaj rondoj, ekzemple pri aktualaj tempoj, pri Duolingo kaj aziaj serioj, pri studprojekto de teksajkolekto por bakalaŭra ekzameno.

Memkompreneble en la Wagner-urbo Bayreuth ne mankis prelegoj pri kelkaj Wagner-operoj kaj ekskursoj tra la markgrafa opera domo „Markgräfliches Opernhaus“, konstruita por la geedziĝo de la filino de markgrafino Wilhelmine, kaj tra la opera domo „Festspielhaus“, kiun Wagner lasis konstrui nur por montri siajn operojn.







Dum la urbogvidado la partoprenantoj travivis, ĉe suna vetero, tre amuzan, informplenan, riĉan enrigardon en la historio de Bayreuth kaj pri la vivo de la markgrafino Wilhelmine. Ili ĝuis belan superrigardon de la kastela turo post grimpado de longa, alta ŝtuparo.

Aliaj prelegoj informis nin pri novaĵoj de Asocio de Nova Familio en DR Kongo, pri celoj kaj eblecoj de partio EDE – Eŭropo – Demokratio – Esperanto, pri makro- kaj mikronutraĵoj aŭ pri interesa hobio de radioprogramfarado.


La aktiva benina Esperanto-parolanto François Hounsounou vizitis enkadre de sia rondvojaĝo la Printempan Semajnon Internacian kaj kontribuis per prelegoj kaj informoj pri festotagoj kaj la edukada sistemo en Benino. Ĉe lia prezentado de Esperanto-movado en okcidenta Afriko, la aŭskultantoj miris pri nekonataj faktoj de kunlaboro de afrikaj Esperanto asocioj kaj de Esperanto instruado.

Inter tiom da disdonitaj informoj ankaŭ la distro de pensoj estis bonvena afero. Tio eblis ĉe manlaboro, kiel ŝtofkolorigado, trikado, muzikumado, origamo, krei krucvortenigmojn, desegnaj kursoj, retrofilmada kurso kaj ĉe konstruado de bumerangoj kaj kajtoj. La ludemuloj amuzis sin ĉe ludado de „unu ĝis dek“, „Dolmätsch“ kaj telepatia kurso. Plia ebleco por ludi estis la sabata ludposttagmezo kun ludmiksaĵo de pasintjaraj ludstacioj.

Sportaj aktivaĵoj (Zumba, Ĉigongo, jonglado kaj kursoj de popoldancado kaj de valso) movigis la gefestantojn de la Paska renkontiĝo. Malgrandaj infanoj amuzis sin konatiĝante kun Esperanto dum la Mazi-kurso kaj ĝuis la rakontojn dum la „pijama“ horo post la vespermanĝo kiel ankaŭ kelkaj plenkreskulaj fabelŝatantoj.

Kiel jam komence menciita, ni havis la bonŝancon spekti eĉ du koncertojn dum la vespera programo, de Kaŝi kaj de Jonny M.

Kaŝi, nevidanto kun elstaraj, muzikaj kapabloj, fascinigis kaj dancigis la spektantaron kaj prezentis, per sia propra ĉarma kaj humorplena maniero, kantojn el multaj ĝenroj.



La longe atendita koncerto de Jonny M kun prezento de lia nova albumo „Petolas“, denove montris la diversecon de lia muziko kaj entuziasmigis la ĉeestantojn.

Pliaj vesperprogramaj kulminoj estis la brile prezentita tabla pupteatraĵo *„Avinjo“ krias Filipo* de Christoph Frank laŭ infanlibro de Gudrun Mebs kaj la kostuma balo „baroko kaj opero“.

Je la fino de la semajno la infanoj frandis ĉokoladajn bananojn dum naskiĝtagfesto. Vespere ĉe Paska fajro oni bakis bastonpanon, ĉirkaŭite de tre agrabla komuna kantado kaj muzikumado.

La travivaĵplena semajno finiĝis per la tradicia ovoserĉado kaj la internacia vespero. Ni spektis kaj muzikajn kaj akrobataĵajn prezentojn, kiel ankaŭ bildojn de 20-a PSI en Duderstadt antaŭ 20 jaroj. Inter la prezentoj ni premiis la gajnintojn de la fotokonkurso.

Por la plimulto de la partoprenantoj la semajno tro rapide pasis kaj ili deziris pluan, daŭrigan, duan semajnon. Por tiuj, kiuj nun sopiras pri nia Paska familia renkontiĝo: jam ekzistas la ebleco aliĝi al la venonta PSI en Hellenthal, Nordrejn-Vestfalio, proksime de la belga landlimo.

Aliĝo ĉe: *https://psi.esperanto.de/eo/2025/*

Por demandoj aŭ instigoj bonvolu skribi al: *psi@esperanto.de*

Kaj grandan dankon meritas la Familio-Fischer-Fondaĵo pro subtenado de partoprenantoj kaj la Eŭropa Unio, kiu per la programo Erasmus+ subtenis la inviton de eksterlandaj spertuloj.

Ĝis revido venontjare 2025 en Hellenthal! La teamo antaŭĝojas!

**La organiza teamo de Printempa Semajno Internacia**

PS.: La organiza teamo ĉiam ankoraŭ bezonas pliajn kunlaborantojn! Bonvolu kontakti nin ĉe: *psi@esperanto.de*

Multan dankon!

# REVELO

## REVELO-Sprachkurs 18.-20. Oktober 2024 Schloss Oberwerries, Hamm.

Kion pri la kongreso mem? Vigla, foje improvizita, tre simpatia. Ni kunvenis (dum ni ne ekskursis tra la manova urbo) en historia hotelo en okcidenta Jerusalemo – foje sur la tegmenta teraso, foje en la kuirejo kaj manĝejo, aŭskultis fakajn prelegojn kaj multe babilis. Israelanoj devenas el ĉiuj partoj de la mondo, eble tial ankaŭ la esperantistoj estas eĉ pli kosmopolitaj kaj multlingvaj ol ni kutimas.




La aktuala situacio ne malhelpis la kongreson kaj la antaŭan programon, sed eble sub normalaj cirkonstancoj estus partoprenintaj pli da gastoj el en- kaj eksterlando.

Mi venis bone tien kaj reen kaj volonte rememoras la semajnon inter rivero kaj maro.

Dankon al Amri, kiu konvinkis min partopreni kaj perfekte gvidis nin tra la lando. Kaj korajn salutojn al la vigla rondo de esperantistoj, kun kiuj mi povis konatiĝi.

**Ulrich Brandenburg**





Partoprenantoj de la Israela Kongreso de Esperanto dum ĝia inaŭguro sur la tegmenta teraso de la kongreshotelo.





# Limburga Tago en Gruitrode

**La 28-an de Aprilo estis Limburga Tago en Gruitrode (Belgujo).**

La regiona grupo el la Limburga regiono organizis tutan tagon kun Esperanto-programo. Ĉeestis kvar partoprenantoj el la Ruhr-regiono.

Ni rapide veturis laŭ la belgaj aŭtovojoj en elektra aŭto – feliĉe sen punbiletoj malgraŭ la striktaj reguloj.

En Gruitrode ni estis salutitaj per peco de belga manĝkulturo: estis kukoj kun fruktaj kompletaĵoj por nia dua matenmanĝo. Poste la urbestro de la nove fondita municipo Oudsbergen faris bonvenigan paroladon.

Post enkonduka prelego de la loka historia societo, ni vizitis ekspozicion pri la 100-a naskiĝtago de la engaĝita pastro Phil Bosmans. Denove la historia asocio kontribuis per historiaj klarigoj, danke tradukitaj al Esperanto.

Reen en la malgranda salono de la komunuma domo estis tre elkore aranĝita bufedo. Mi memoras la molajn bulkojn, kiuj povas esti kunpremitaj.

Malgraŭ la ŝanĝiĝema vetero, ni trovis kelkajn horojn da promenado en la frua posttagmezo. La ministo-historio formis la regionon, kaj tio povus esti sentita en multaj anguloj. Ekzemple, koniferaj arbaroj estis faligitaj por minado en la lasta jarcento, ĉar ili estis precipe taŭgaj por konstrui tunelojn.

La grupo estis ankaŭ imponita de la loka urbopalaco kaj ĝia renovigo. La banana pano ame bakita de An kaj forta kafo anoncis la lastan eron de la programo, kiu denove koncentriĝis pri la regiono. La tago finiĝis en amika etoso en la drinkejo.

**Andreas Diemel**

# Mit Esperanto in Madagaskar

**Madagaskar ist ein sehr armes, aber zugleich auch sehr weltoffenes Land.**

Dank Esperanto hatte ich in der Corona-Zeit einige tiefe Freundschaften dorthin gefunden und die bekanntesten Esperanto-Sprecher dieses Landes als weise, warmherzige, religiöse und zugleich sehr offene Menschen kennengelernt.

Anlass für meine Reise war einerseits eine Einladung von Ranja Zafinifotsy, die ich bereits auf dem Esperanto-Weltkongress 2023 in Turin getroffen hatte, und ihrer Familie, andererseits aber auch die Idee von Miora Raveloharison, ein christliches Esperanto-Seminar zu organisieren. Ranja ist Direktorin der von einer französischen Stiftung finanzierten Schule Ecole associative l'île aux enfants in einem Armenviertel im




Partoprenantoj de Limburga Tago en Gruitrode.
Foto: La aŭtoro.

Süden der madagassischen Hauptstadt Antananrivo, und Miora ist promovierte Theologin und Pastorin der reformierten Kirche Madagaskars.

Als Termin für das Seminar hatten wir dann den 7. bis 9. März 2024 festgelegt. Meine Reise von Frankfurt über Addis Abeba nach Antananarivo verlief völlig problemlos. Im dortigen Flughafen musste ich lediglich zwei kleine Formulare, die ich im Flugzeug erhalten hatte, ausgefüllt abgeben und eine Verwaltungsgebühr von 10 € zahlen; ein Visum braucht man als Deutscher für Aufenthalte bis 15 Tage nicht. Freundliche Zollbeamte baten mich sogleich, mit meinem Gepäck – ich hatte 20 kg Esperanto-Bücher dabei – direkt zum Ausgang zu gehen, wo die Familie Raveloharison auf mich wartete. Es freute mich, dass ich auch mit Jonathan, dem 11-järigen Sohn der Familie, Esperanto sprechen konnte, während ich mich mit Mioras Ehemann, Pastor Poina, nur auf Französisch verständigen konnte.

Alle 11 Tage in Madagaskar habe ich in Begleitung der dortigen Esperanto-Sprecher verbracht. Höhepunkte in den ersten 6 Tagen waren Ausflüge zu einem Lemuren-Park (mit den Familien Zafinifotsy und Raveloharison), zu den Wasserfällen von Lily (mit Famillie Raveloharison und Edgar Piščikas, einem Esperanto-Sprecher aus Litauen, der schon als Kind durch die Musikgruppe Asorti bekannt wurde), aber auch ein Besuch bei der Familie des madagassischen Esperanto-Veterans Henriel Fidilalao (der, so wie ich, die Sprache schon seit 1986 spricht). Rührend war für mich, wie einfach und bescheiden die meisten Madagassen leben: Während Mioras Familie immerhin vom Abend bis zum Morgen (nicht jedoch tagsüber) Leitungswasser hat, holt Ranjas Familie das Wasser stets mit einem Eimer aus einem Zugbrunnen vor ihrem Haus.

Zu dem Christlichen Esperanto-Seminar in Antananarivo hatten sich (trotz des nicht sehr günstigen Zeitpunkts von einem Donnerstag bis zum Samstag) 43 überwiegend junge Leute angemeldet. Mein Vortrag zum Seminarthema „Vizioj por pli bona mondo“ – „Visionen für eine bessere Welt“ rief zahlreiche Fragen hervor, z.B. ob es anfangs sehr hart gewesen sei, Vegetarier zu sein, ob es Korruption auch in Deutschland gibt oder ob die ehemalige chinesische Ein-Kind-Politik nun ein Vorbild für Madagaskar sein könne. Erstaunlich gut funktionierten die





Arbeitsgruppen im Anschluss an meinen Vortrag. Obwohl die meisten Teilnehmer erst seit etwa einem Jahr Esperanto lernten, konnten sie die Aufgaben in den Gruppen meist gut lösen. Eine dieser Aufgaben bestand darin, dass jeder Teilnehmer kurz eine Idee vorstellt, wie man Armut und Hunger in Madagaskar überwinden kann.

Gemeinsam lernten wir etwa 10 christliche Lieder auf Esperanto. Einige davon hatten Miora und ich kurz vor dem Seminar aus dem Malagasy übersetzt, andere lernten wir anhand des Gebet- und Gesangbuchs „ADORU“. Wunderschön war ein Ausflug zum ersten madagassischen Königspalast – an einem herrlichen Spätsommertag mit vielen netten jungen Leuten, die allesamt noch nie zuvor einen Esperanto-Sprecher aus dem Ausland getroffen hatten.

In dem kirchlichen Bildungshaus gabe es kein warmes Wasser und nur einfaches Essen; die jungen Leute übernachteten jeweils in einem Schlafsaal für Mädchen und einem für Jungen. Dafür kostete die Vollpension dort nur rund 12 € pro Tag. Dank eines Zuschusses des deutschen Landesverbands der Internationalen Christlichen Esperanto-Liga KELI mussten die Teilnehmer aus Madagaskar (einem Land, wo 80 % der Bevölkerung weniger als 2 € pro Tag zur Verfügung hat) nur rund 10% der Kosten selbst tragen. Am Schluss des Seminars äußerten sich die Teilnehmer allesamt sehr zufrieden. Zu meiner Überraschung wurde sogar das Essen von zwei Dritteln mit „tre bona“ und von den übrigen Teilnehmern mit „bona“ bewertet.

Dank des großen Erfolgs hat Miora vor, auch im nächsten Jahr wieder so ein Seminar zu organisieren. Das Thema soll dann „Frauen in der Bibel und der heutigen Welt“ sein, ein wichtiges Thema gerade in Madagaskar, wo nach Schätzung von Ranja und Miora 50 % oder mehr der Frauen von ihren Ehemännern geschlagen werden.

Auch ich habe vor, dann wieder dorthin zu fahren. Nach dem Seminar bekam ich über den Facebook-Messenger noch viele Nachrichten jugendlicher Teilnehmer. Besonders beeindruckt haben mich die Worte eines 16-jährigen Mädchens: „Wenn ich groß bin, möchte ich Esperanto-Lehrerin werden.“

**Ulrich Matthias**





# Trajnvojaĝo tra Japanio

## Alveno en Jokohamo (Yokohama)

### Je la 17-a de marto 2024 mia nevino Zofi el Munkeno kaj mi renkontiĝis en la flughaveno Frankfurt/Main.

Post 12-hora, agrabla flugo je la 18-a matene ni alvenis en la flughaveno Tokio-Haneda, kie sinjoro Namba atendis nin.

Li helpis nin aĉeti japanan SIM-karteton kaj trovi la buroon de la ŝtata fervojo. Tie ni ŝanĝis niajn kuponojn kontraŭ trajnbiletoj „Japan Rail Pass“, kiuj tre utilis dum la sekvaj du semajnoj.

Sinjoro Namba akompanis nin al Jokohamo, kie, en la hotelo Sakuragicho atendis nin la gesinjoro Ŝibayama. Zofi kaj mi lasis niajn valizojn en la hotelo kaj kvarope ni, parte per urbaj busoj, parte piede, rigardis la urbon. Inter alie ni vidis iaman haven-laboristan kvartalon. La haveno intertempe troveblas pli malproksime de la urbocentro, la laboristoj malaperis sed la knajpoj restis. En la plej ŝatata knajpo de la Jokohamaj esperantistoj ni ĝuis bieron, produktita laŭ ĉeĥa maniero, kun fiŝaĵoj, polpo kaj aliaj japanaj manĝaĵoj.

Post iom da ripozo sjinjoro Namba gvidis nin la la turdomego Landmark Tower. Per la plej rapida lifto de Japanio ni atingis la 69-an etaĝon, de kie ni ĝuis la elrigardon al haveno kaj urbo. Finis la tago en subtera knajpo per Sapporo-biero kaj salitaj fazeoloj.

Je la 19-a gesinjoro Ŝibayama gvidis nin al Kamakuro. Samtempe kun multaj aliaj turistoj ni vizitis la urbon kaj la faman, grandegan Budho-statuon. Ĉi statuo tiom grandas, ke eĉ eblas, eniri ĝin kaj rigardi ĝin de interne!

Tre plaĉis al ni la belega ĝardeno sur monto kun templo, groto kaj ŝintoisma sanktejo. Krome ni de tie havis belan rigardon al la golfeto de Sagami. Per tramo ni reveturis al la urbocentro kie ni manĝis bongustajn frititajn fiŝaĵojn.

Post nia reveno al Jokohamo ni vizitis la iaman lumturon Yokohama Marine Tower. De ĝia belvidejo, 94 metroj super la grundo, ni rigardis havenon kaj urbon. En la teretaĝo troveblas bona kafejo. Tie ni ripozis, trinkis kafon kaj formanĝis vaflon kun agavo-suko kaj pankuketojn kun granda porcio da batita kremo.

Je la 20-a de marto Zofi kaj mi memstare vizitis belan ĝardenon kun vido al la haveno kaj la fama havenponto. Posttagmeze sinjoro Namba kaj mi vizitis la Esperanto-centron de Jokohamo. Temas pri bela domo en trankvila kvartalo, tamen facile atingebla per metroo. Tie afable akceptis nin gesinjoroj Doi. Krom ili ĉeestis juna virino, lernantino de sinjorino Doi. Kvinope ni kunsidis kun taso da teo kaj mi prezentis miajn fotojn pri Ŝverin.

Je la 21-a Zofi kaj mi per trajno kaj metroo veturis al la urbocentro de Tokio. Helpe de ŝia saĝtelefono ni trovis altegan turdomegon de urbkvartala administraro. Dungitoj en uniformoj kontrolis niajn tekojn kaj dorsosakojn kaj post tio ni per lifto suprenveturis al la panoramo-etaĝo. Ni rigardis kaj fotis la urbon kaj eĉ vidis la faman monton Fuji-san.

Ebisu estis nia dua stacio. Tie ekzistas ponto por piedirantoj, tiom longa, ke eĉ homtransportaj rubandoj ekzistas, simile al tiuj en grandaj flughavenoj. Unue ni ekvidis ruĝbrikan konstruaĵon. La turdomego aliflanke de ĝi ankaŭ havas belvidejon kun multaj restoracioj. Afabla kelnerino gvidis nin al ĉambreto kie ni manĝis bongustajn pladojn kaj ĝuis la vidon al la urbo.

Post mallonga vizito en la Japana Esperanto-Instituto Zofi gvidis min al alia kvartalo, kie laŭ indiko de spertulo troveblas tetrinkejo kun malgranda, bela ĝardeno. Ni sidis ĉe malalta tablo kaj afabla sinjorino regalis nin per verda „Maĉa-teo“ kaj japanaj dolĉaĵoj.

Je la 22-a de marto Zofi kaj mi per metroo veturis al la stacidomo Ŝin-Jokohama (Nov-Jokohamo). Ĉar japanaj trajnoj preskaŭ neniam havas restoracio-vagonon, ni unue aĉetis skatolon kun manĝaĵoj. Veturi per Ŝinkanzen tre plaĉis al ni. Pli ol la rapido la akurateco kaj la nombro da trajnoj dum unu horo forte impresis nin. Sur la kajoj klare videblas, kie haltos kiu pordo de kies vagono. La vojaĝontoj staras iom flanke por ke la alvenintoj rapide eliru kaj ili mem rapide eniru la ĝustan vagonon.

Spektante la pejzaĝon subite ni tute klare vidis la monton Fuji-san, kio pro nuboj kaj nebulo ne tro ofte okazas. Ni tagmanĝis en la trajno kaj post agrabla vojaĝo ni alvenis en Kioto, kie la gesinjoroj Mizutani sur la kajo atendis nin. La stacidomo de Kioto, same kiel en aliaj grandurboj, estas



grandega kaj konfuziga konstruaĵo. Dank' al niaj lertaj gvidantoj ni facile trovis nian tranoktejon en mallarĝa strato. Tie ni lasis niajn valizojn kaj post mallongdaŭra piedirado ni atingis la iaman imperiestran palacon Nijō-jō. Temas pri unuetaĝa domego kun multaj ĉambroj kaj diversaj murpentraĵoj. Specialaĵo de ĉi palaco estas la „kantanta planko“. Pro eksterordinara konstrumaniero la planko kreas birdo-similajn sonojn, kiam homoj iras sur ĝi. Plua kulmino estis la promenado tra la granda, japanstila ĝardeno kiu ĉirkaŭas ĉi palacon. Vespere la gesinjoroj Mizutani eĉ invitis nin al restoracio, kie ni kvarope ĝuis japanajn pladojn.

Sekvamatene sinjoro Mizutani atendis nin ĉe la metro-enirejo. Alvenis afabla sinjorino kaj kvarope ni per busoj zigzagveturis tra Kioto por viziti la plej famajn vidindaĵojn. Ni komencis per la „Ora Pavilono“, kiu troviĝas apud lago en granda ĝardeno. Komune kun multegaj turistoj ni piediris laŭ unudirekta vojo tra la ĝardeno. Ambaŭ, kaj la pavilono kaj la ĝardeno, tre plaĉis, kvankam longdaŭra pluvo iom ĝenis nin. La dua vidindaĵo estis templo kun „Roka Ĝardeno“. Sur granda, sabla areo kuŝas 15 diversgrandaj ŝtonegoj, sed ekzistas neniu starpunkto, kie kiu ili ĉiuj samtempe videblas. Oni klarigis al ni, ke tio estas simbolo de ne-perfekteco.

Post bongusta tagmanĝo „Okonomiaki“, kies nomon sinjoro Mizutani tradukis per „laŭ via plaĉo“, ni busveturis al mallarĝa strato, plenplena da homoj. Konstante suprenirante ni fine alvenis sur monto, kie ni kaj rigardis la templon kaj ĝuis la belan pejzaĝon.

Dum la tria tago ni ekskursis al Osaka kaj dum la kvara al Nara. Sed tion mi priskribos en la dua parto de mia vojaĝo-raporto.

**André C. Weber** [E-klubo Ŝverin]

# Rainer Kurz vizitis Ŝanhajon

**Unu de miaj celoj de lerni Esperanton estas amikiĝi kaj komuniki kun esperantistoj el diversaj landoj.**

Laŭ mia sperto Esperanto estas pli efika por mia celo ol la angla. Mi trovis surprizite, ke Esperanto povas alporti al mi pli da ŝancoj por komuniki kun alilandanoj, inkluzive de retpoŝtaj korespondadoj, kaj vizaĝ-al-vizaĝaj renkontiĝoj kun pluraj gastoj de Esperantujo el diversaj landoj, kio plibonigas vaste mian lingvonivelon.

Marte ĉi-jare s-ro Rainer Kurz vizitis nian urbon Ŝanhajon, pro la dumtempa resto dum sia vojaĝo el Aŭstralio al Germanio. Posttagmeze de la 16-a de Marto, membrino de nia asocio S-ino Wang Lu kaj mi, akompanis lin viziti iujn vidindaĵojn centre de nia urbo.

Ni babilis pri diversaj temoj, ekde la edukado kaj disvastigo de Esperanto, ĝis la teknologia evoluo en Ĉinio, kaj ankaŭ la volo de kunlaboro pri Esperanto inter Germanio kaj Ĉinio.

S-ino Wang esperis, ke ni, ĉinaj esperantistoj, lernos de s-ro Kurz, kiu havas abundan sperton instrui Esperanton en diversaj landoj. Ni ankaŭ esperis, ke iam estonte, se eblus, s-ro Kurz kunhavigos al ni siajn instrumaterialojn, kiujn verkis li en diversaj lingvoj, provizonte al ni novan perspektivon pri kiel efike instrui kaj lerni Esperanton.

S-ro Kurz kaj mi ankaŭ parolis iom pri historio kaj ekonomio. Li diris ion pri la rilato inter la ideologio kaj la ekonomia sukceso. Nova ideologio en moderna historio ofte signifas novan liberigon de penso, rompante la ekskluzivan rajton interpreti la veron.

Pro la peto de s-ro Kurz, ni ankaŭ vizitis la kongresejon de la unua kongreso de la Ĉina Komunista Partio, kio delonge interesis s-ron Kurz. Mi iagrade tradukis kaj klarigis al li la priskribaĵojn pri la ĉina revolucia historio en la muzeo, per kio li pli bone komprenis la pensmanieron de la modernaj ĉinoj pri la historio.

Matene de la 17-a de Marto s-ro Kurz prelegis al nia asocio pri sia vizito al Pekino kaj sia kunlaboro kun la Esperanta departamento de la Ĉina Radio Internacia ĈRI antaŭ pli ol dek jaroj. Pro la amaskomunikilo, posedata de la ŝtato, li estis mirigita de la ĉina Esperanto-movado, kiun iugrade subtenas la ĉina registaro.

Li ankaŭ rememorigis sin pri la vizito al la urbo Pekino, kie estas multaj vidindaĵoj pro ĝia longa historio esti kiel la ĉefurbo kaj la ekonomia centro; kaj la najbara urbo Tianjin, kie ankaŭ estas multaj tradiciaj kulturaĵoj, miksite kun modernaj Eŭropostilaj kulturaj elementoj, pro ke tie estas kelkaj partoj poseditaj kaj regitaj de Eŭropaj landoj antaŭ pli ol 100 jaroj. La tradiciaj manĝaĵoj, ekzemple la Pekina Anaso kaj la Tianjina Baozi ankaŭ mirigis lin.

Mi ĉiam grandvalorigas ĉiujn vizitojn de samideanoj el diversaj landoj, kio alportas al la ambaŭ flankoj novajn spertojn. Ĝuste laŭ la Zamenhof-stila ideo, ke komuniki reciproke povas konduki al profunda kompreno kaj fine al paco, mi esperas, ke pli da germanaj esperantistoj povus viziti nian urbon, Ŝanhajon kaj nian asocion, kaj interŝanĝi ideojn kun ni.

**Zhang Xuelei**



Kurz ĉe la Ŝanhaja Asocio.





# Hej GEJ-Gazeto-leganto!

En tiu ĉi eldono estas multege da raportoj el eventoj. Ŝajne ni multe renkontiĝadis dum la lastaj du monatoj: Komence de majo ja okazis la Eŭropa Esperanto-Kongreso 2024 en Strasburgo, Francio, kaj paralele al ĝi … BRECO. Do la junulara krom-programo aŭ krom-evento (depende de vidpunkto), kiun la germana kaj franca Esperanto-junularoj realigis kune. Menciindas, ke tiun junularan eventon finance subtenis Franc-Germana Junular-Oficejo (DFJW / OFAJ). Fakte, en Strasburgo partoprenis du novuloj, kiuj raportas siajn spertojn pri BRECO ĉi tie: Sebastian Bremser el Germanio kaj Ophélie Haurou-Béjottes el Francio. Estas tre ĝojige, ke ili tre pozitive priskribas siajn travivaĵojn de la evento, kiu fakte por ambaŭ estis ilia unua Esperanto-kongreso iam ajn partoprenita!

Sed ankaŭ la monato antaŭe (aprilo 2024) estis sufiĉe okazoplena ĉe ni: Renkontiĝis nove fondita junulara Esperanto-grupo en Nurenbergo. Pri tio rakontas al vi ĉi tie Utku Özdemir. La instigo pri revivigo de lokaj grupoj naskis ĵus malmultajn semajnojn pli frue, dum la GEJ-Semajnfino en Berlino, dum kiu kvin motivitaj aktivuloj de GEJ kune cerbumis kaj evoluigis planojn por sekvaj komunaj agadoj. Inter ili estis Paul Widzgowski, kiu resumas la okazaĵojn de la GEJ-Semajnfino en aparta artikolo.

Lasante flanken jam la event-raportojn, jen du pliaj legindaj kontribuoj: En konciza artikolo verkita en la germana, nia juna membro Annika Weeser-Krell informas vin pri vizitindaj lokoj en Eŭropo, kiuj havas rilaton al Esperanto kaj ties movado. Kaj fine, Utku Özdemir prezentas al vi kelkajn impresojn pri sia studenta vivo en la urbo, kie li loĝas: Erlangen.

Kiel ĉiam, ni deziras al vi agrablan legadon!

**Michael Vrazitulis kaj Paula Weil, por redakcio de GEJ-Gazeto**

**Franc-Germana Junular-Oficejo finance subtenis BRECO-n en Strasburgo (8–12 majo 2024) kadre de la projekto „Horizons communs: Communication et compréhension interculturelle“.** ▼▼▼

OFAJ Office Franco-Allemand pour la Jeunesse
DFJW Deutsch-Französisches Jugendwerk


Grupfoto dum ekskurso de BRECO.

# Raporto pri BRECO en Strasburgo (Majo 2024)




Jen mi: unua kongreso, ĵus alvenis en nekonata urbo kaj konas neniun el la partoprenantoj. Tuj venis demando „Ĉu vi ŝatus helpi alporti aĉetitajn manĝaĵojn al la loĝejo?“ Do kiam ni staris kun sakoj plenŝtopitaj en la tramo, mi jam sentis min iomete integrita. Nokta promenado tra la Eŭropa kvartalo donis belan finon por la alventago.

Sekvis pluraj komune prizorgitaj manĝadoj en amikeca etoso kaj eĉ piknikoj sur la gazono antaŭ la kongresejo. Krome, en du vesperoj ni kiel tuta grupo veturis trame al la koncertejo por spekti plej diversajn prezentaĵojn.

Aparte bona sperto estis la urbogvidado, dum kiu kelkaj el ni fiere portis verdajn flagojn tra la malnova kvartalo de Strasburgo. Poste ni partoprenis amuzan ludon de la skoltoj, kiu sendis nin i.a. al la supro de 35 metrojn alta turo. Do fine veturis mi hejmen ne nur kun sunbrulo ekstere, sed ankaŭ pli verda interne.

**Sebastian Bremser**



Marŝante tra Strasburgo kun suna vetero.



Brecoj ne mankis dum BRECO.

# Mia unua sperto en Esperantujo dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso

Dum pli ol tri jaroj, mi lernis Esperanton per Duolingo, sed ankoraŭ ne aliĝis al iu ajn evento.

Kiam mi festis miajn 1000 sinsekvajn tagojn de Duolingo-lecionoj, la demando, kiun mi plej ofte ricevis de miaj amikoj, ne estis „Kion vi faris por daŭre lerni dum 1000 tagoj?“ aŭ „Ĉu vi povas instrui al mi kelkajn vortojn en Esperanto?“. Ne. Ĉiu demandis al mi: „Kun kiom da esperantistoj vi jam kunparolis?“. Kaj la respondos estis … malmulte da uloj! Post la festo, mi tuj aĉetis biletojn por la Eŭropa Esperanto-Kongreso por finfine paroli kun multe da homoj. La plej bona ideo, kiun mi havis, estis ankaŭ aliĝi al BRECO, la junulara evento, kiu okazis samtempe kun la EEK. Mi tuj renkontis multe da uloj, kiuj parolis Esperanton kaj aĝis pli-malpli same kiel mi. Mi lernis, ke mi kapablas paroli nur Esperanton dum 5 tagoj sen problemoj.




Mi kun mia 1000-tagoj kuko.
La frazo „Mi scivolas, ĉu tiu kurso vere utilas“ estas skribita sur la kuko. Diskonigo: ĝi vere utilas



Antaŭ la lasta koncerta vespero ni farbis niajn ungojn orkolore.

La etoso estis belega, kaj ĝi igis min pensi pri skoltaj semajnfinoj aŭ Erasmus-semestroj. Ni kune kuiris, manĝis, vidis koncertojn, partoprenis en la kongreso kaj vizitis Strasburgon. Ni parolis pri Eŭropo, Esperantujo, niaj vidpunktoj.

Mi renkontis ulojn, kiuj klarigis al mi gramatikajn punktojn aŭ pligrandigis mian vortprovizon.

Je la fino de la EEK, mi decidis partopreni en aliaj Esperanto-eventoj kaj aliĝi al TEJO. Kiam mi foriris, mi havis amikojn ĉie en Eŭropo kaj mi senpacience atendas mian sekvan viziton en Esperantujo!

Konklude, lerni Esperanton kun Duolingo bonas, sed fakte veturi al Esperantujo bonegas!

**Ophélie Haurou-Béjottes**

# Raporto pri la 1-a Nurenberga GEJ-Renkontiĝo

La 20-an de aprilo okazis la 1-a Nurenberga GEJ-renkontiĝo. Antaŭ la evento, GEJ publikigis afiŝojn pri ĝi en siaj sociaj medioj por instigi junulojn de la regiono partopreni kaj tiel ekkoni lokajn esperantistojn. Al la renkontiĝo venis 3 aktivuloj, sed bedaŭrinde neniu novulo. La evento komenciĝis en kafejo, kie la partoprenantoj ĝuis dolĉaĵojn kaj kafon, dume babilante pri siaj agadoj en Esperantujo. Kompreneble la konversacioj ne estis limigitaj nur al la temo de Esperanto kaj ankaŭ ebligis ĝenerale pli bone koni unu la alian. Sekve okazis ekskurso tra la historiurbo de Nurenbergo malgraŭ la pluveto. Je la fino de la evento la ĉeestantoj konsentis daŭrigi tiun lokan renkontiĝon regule, ĉiun monaton. Ni ĉiuj esperas, ke kun helpo de la retaj afiŝoj kaj personaj rekomendoj, en la estontaj renkontiĝoj la nombro de la junuloj – precipe de la novuloj – plialtiĝos.

**Utku Özdemir**




Nurenberga GEJ-grupo sur ponto.



Ni manĝis kune ekster la kongresejo ĝaude.



Nurenberga GEJ-grupo memfotante antaŭ memorplakedo pri Leopold Einstein, esperantista pioniro.

# La GEJ-Semajnfino en Berlino (Aprilo 2024)

De la 12-a ĝis la 14-a de aprilo, GEJ faris sian kvinan GEJ-Semajnfinon, ĉi-foje en Berlino, kie ni uzis la „Esperanto-Laden", nian oficejon oficialan. La honoritajn gastojn el Bavario la prezidanto (ne Steinmeier, sed almenaŭ Vrazitulis) eĉ atendis persone je la stacidomo kaj ofertis al ni vespermanĝon. Sabate ni daŭre kaj sukcese prilaboris diversajn temojn: La jam malnove ŝajnanta retpaĝo estis renovigita kaj nova germana slogano estis adoptita: „Ein Verein, der über Sprache vereint." (Unio, kiu unuigas pere de lingo.) La legorondo de GEJ – nun la LeGEJo – estos revivigita. Pri tio, pliaj informoj baldaŭ sekvos. Nova formato pri maloftaj vortoj kaj etimologio estis priparolata, kaj la unuan provon la estontecaj lagantoj eble jam vidis dum BRECO en Strasburgo, kie oni povintis lerni pri la diversaj fiŝnomoj de Esperanto kaj diveni ties originojn.

En aŭtuno estiĝos eĉ plia loka formato pri esplorado de urboj. Eble ankaŭ estiĝos nova tradukorondo pri tradukado de nacilingvaj kantoj, kiuj nepre ne devas temi pri TEJO-volontuloj, al Esperanto rete. Du lokaj kunvenoj de GEJ estis estigitaj: unu en Berlino, prizorgata de Ana kaj Michael, la alia en Nurenbergo en norda Bavario (aŭ Frankio), prizorgata de Viktoria, Utku kaj Paul. Ni ambaŭkaze komencos renkontiĝi unufoje monate, kaj la kunvenoj publikiĝos je Eventa Servo.

La vespero konkludiĝis kun picomanĝo kaj vizito al berlina „Späti", malfruvendejo. Laŭdire ankaŭ estas malfruvendejo nomata „Esperanto" – vizitindaĵo por alia fojo en Berlino! Flanke de la oficialaj oficejaj oficaĵoj eblis arĥiva spekto al pastinteco: La plej malnova gazeto kiun ni trovis estis el Rusio el la jaro 1910, kiu enhavis tre revemajn versaĵojn pri Zamenhof. Eĉ pli interesaj tamen estis la varbaĵoj: Oni vendis kaj aŭtojn de Ford kaj skribmaŝinojn kun ŝanĝeblaj literoj pere de esperantilingvaj varbiloj, foje eĉ uzante „Spesmilon", moneron, kiu emis esti la Esperanto de valutoj. Ĉu eble ankoraŭ ekzistas tiaj skribmaŝinoj, kiuj solvis la ĉapelan problemon, kiu eĉ nun ĝenas esperantajn uzantojn de nuntempaj skribprogramoj?

Dimanĉe, kaj la GEJ-a kaj la kalendara semajnfino finiĝis, kaj – almenaŭ por tiuj, kiuj ne loĝas en Berlino, hejmvojaĝo komenciĝis. Ĝis BRECO!

**Paul Widzgowski**


Post farita laboro, ripozante en „Viktoriapark", apud la oficejo.

# Europäische Reiseziele für Esperanto-Interessierte

Wusstest Du, dass es viele Orte mit einem direkten Bezug zu Esperanto gibt? Ich habe hier eine kleine Auswahl zusammengestellt.

Beginnen wir mit Reisezielen in Polen. Der Begründer der Plansprache Esperanto Ludwik Lejzer Zamenhof starb im Jahr 1917 im Alter von 57 Jahren in Warschau, der heutigen Hauptstadt Polens. Dort kann man bis heute auf dem Jüdischen Friedhof sein Grab besuchen, welches mit einem Mosaik, das den grünen fünfzackigen Esperanto-Stern zeigt, versehen ist. In Warschau gibt es außerdem eine Esperanto-Straße (Ulica Esperanto) und eine Zamenhof-Straße (Ulica Ludwika Zamenhofa, benannt 1930), in welcher Ludwik Zamenhof selbst gelebt hat. Die Straße war während des Zweiten Weltkriegs Teil des Warschauer Ghettos, in welches Zamenhofs Töchter eingewiesen wurden. Heute erinnert die Straße durch mehrere Denkmäler und ein Museum an die deutsche Besetzung Polens und die Geschichte polnischer Juden und Jüdinnen während des Zweiten Weltkriegs. In Österreich habe ich zwei Städte mit esperantobezogenen Orten herausgesucht. Als ich selbst in Graz war, entdeckte ich zufälligerweise auf Google Maps den Grazer „Esperanto-Platz". So benannt wurde der Platz anlässlich des Esperanto-Kongresses 1949, an dem 330 Esperantist:innen aus Großbritannien, Frankreich, Dänemark, Ungarn, der Schweiz und Österreich teilnahmen. Im Jahr 1987, 100 Jahre, nachdem Zamenhof das erste Esperanto-Lehrbuch veröffentlichte, wurde auf dem Grazer Esperanto-Platz ein Denkmal aufgestellt. Es hat folgende Inschriften: „La espero por monda komunikado en paco kaj libero", „Die Hoffnung auf Völkerverständigung in Frieden und Freiheit", „100 jaroj Esperanto 1887–1987" und „100 Jahre Esperanto 1887–1987".

Auch in der österreichischen Hauptstadt Wien bin ich fündig geworden. Dort wartet in der Österreichischen Nationalbibliothek ein ganzes Esperanto-Museum auf alle Plansprachen-Interessierten. Auf interaktive Art und Weise vermittelt das Museum nicht nur die Geschichte von Esperanto, sondern gibt auch einen Einblick in andere Plansprachen wie etwa Klingonisch aus der Serie „Star Trek".

Im tschechischen Zwittau (ca. zwei Autostunden von Prag, eine gute Autostunde von Brünn entfernt) befindet sich ein weiteres Esperanto-Museum (Esperanto-Muzeo en Svitavy), welches eine Dauerausstellung und eine jährlich wechselnde Themenausstellung zu bieten hat. Der Zwittauer Esperanto-Klub bietet hier Führungen auf Esperanto an!

**Annika Weeser-Krell**

# Studenta vivo en Erlangen

Erlangen, kun siaj ĉ. 120.000 loĝantoj, estas la plej malgranda grandurbo de Bavario kaj situas en Nordbavario, en la regiono de Frankonio, nur 20 km for de Nürnberg (Nurenbergo). Historie gravas la urbo ĉefe pro la fakto ke la urbo bonvenigis kaj iusence refondiĝis de amaso da religiaj rifuĝintoj, kalvinistoj el Francio (ankaŭ konataj kiel hugenotoj), kiuj devis fuĝi de sia lando pro la religia persekutado post 1685. Kun helpo de tiu migradondo la novurbo Erlangen estis (re)konstruita kiel „idealurbo" tiusence, ke la stratoj kaj domoj formiĝis laŭ planoj kun celitaj geometrioj. Kvankam multaj kulturaj aspektoj, kiuj enmigris kun hugenotoj hodiaŭ ne plu forte rimarkeblas, tamen la arĥitekturo daŭre montras la apartan esencon de Erlangen kompare al apudaj lokoj kiel Fürth aŭ Nürnberg.


Strato en la centro de Erlangen.



Memorŝtono pri la fizikisto Ohm.

La nuna Erlangen povas esti priskribita kiel universitaturbo, sed ankaŭ kiel industriurbo. Kun 39.000 studentoj (triono de la loĝantaro!), la loka universitato „Friedrich-Alexander-Universität Erlangen-Nürnberg" (FAU) multege kontribuas al la juneco kaj vigleco de la surloka vivo. De la historiurbo ĝis la randaj kvartaloj eblas trafi universitatajn instituciojn kiuj provizas kaj edukadon kaj diversajn servojn al la urbanoj. Inter la universitatoj de Germanio, medicino, medicinteĥniko kaj materialscienco estas kelkaj ekzemploj de fokusitaj/konataj fakoj ĝuste ĉe tiu ĉi universitato. Pri la industriurbo-flanko de Erlangen, oni nepre devas mencii la firmaon „Siemens", kiu ekde la Dua Mondmilito havis siajn ĉefajn administrad- kaj esplorinstituciojn en Erlangen. Tiu grandkompanio havis (kaj ankoraŭ havas) tiom grandan rolon en la evoluo de la urbo, ke oni ofte menciis la urbon kiel „Siemens-urbo". Precipe koncentriĝas la medicinteĥnikaj esploroj de Siemens (ekz. komputiltomografio-maŝinoj) en Erlangen kunlabore kun la universitatkliniko. Indas mencii ankaŭ „Adidas" kaj „Puma", kiuj estis fonditaj kaj ankoraŭ havas sidejojn en tre proksima vilaĝo Herzogenaurach.

Kiel magistra studento pri materialscienco, por mi estis pluraj poraj faktoroj por studi en Erlangen. Mia ĉefkialo estis, ke mia fako apartenis al unu el la fortoj/fokusoj de la universitato. Alia granda avantaĝo estas la juneco kaj internacieco de Erlangen pro la universitato kaj pro


Parko en Erlangen.

# Mortis Norbert Karbe

**Je la 28-a de Majo 2024 mortis nia kara kaj longjara membro Norbert Karbe.**

Li estis nia membro dum pli ol 50 jaroj. Multaj rememoras lin, ĉar li ofte partoprenis kongresojn kaj renkontiĝojn.

En sia junaĝo li suferis apopleksion, pro kiu li restis grave handikapita dum sia tuta vivo. Li tamen majstris sian vivon, ĉar li neniam perdis sian humuron kaj precipe pro sia katolika kredo, kiu estis tre grava por li. Krom Esperanto liaj hobioj estis fungoj, pri kiuj li estis vera fakulo, kaj la fotografio.

Nepre mencienda estas la fakto, ke li kaj lia edzino Christiane multe kontribuis al nia asocio, ankaŭ per financa subteno, pro kio ni kore dankas. Li restos eterne en nia rememoro.

**Andreas Emmerich**



multnombraj grandaj kompanioj. Tio ankaŭ signifas pli grandan ŝancon kaj diversecon de laboropcioj. Ankaŭ tre gravas la ĝenerala etoso de la loko: Erlangen ja estas pli silenta, serena, malgranda loko, sed estas ĉirkaŭita de naturaj belaĵoj kiel „die Fränkische Schweiz", turismaj urboj kiel Würzburg, Bamberg, Rothenburg ob der Tauber kaj la granda urbo Nürnberg kun ĉiaj kulturaĵoj. La biciklo-infrastrukturo de Erlangen estas unu el la plej bonaj en Germanio kaj facile bicikleblas preskaŭ ĉien pro la malgrandeco sed ankaŭ, ĉar la urbo ĝenerale estas sufiĉe ebena. Aldone, situante en Sudorient-Germanio, relative facile atingeblas Ĉeĥio, Aŭstrio kaj Italio. Resume, miaopinie la regiono provizas tre taŭgajn kondiĉojn por la bezonoj de studentoj, laborantoj kaj ĝenerale por sia loĝantaro. Indas konsideri ĝin por ekstudi aŭ almenaŭ por viziti!

**Utku Özdemir**

# Spontanea kunveno en Frankfurto/Majno



**Pro la ideo de samideano Gradimir Kragic okazis spontanea internacia kunveno de blindaj esperantistoj ĉe la prezentado de komerca foiro "Sight City" 2024 en Frankfurto/Majno, de la 15-a ĝis la 17-a de Majo 2024.**

La 16-an de Majo 2024 diskutis malgranda internacia grupo de blindaj esterantistoj preskaŭ 90 minutojn en la kafejo la kvaran tagon de la prezentado de la komerca foiro. La temoj estis voajaĝproblemoj kaj teknikaj helpiloj por blinduloj, pasporta servo, retradio en Esperanta lingvo, internacia kunlaboro kaj raporto/rakonto de la Sight City en mp3-formato.

Ekis la ideo fari ĉiujare kunvenon de blindaj esperantistoj en la prezentado de komerca foiro „Sight City" kun preskaŭ 5000 vid-difektaj vizitantoj.

Estos bonŝanco informi kaj prezenti multajn eblecojn de la planlingvo Esperanto ankaŭ pere de la informilo kaj prelegoj. Bonvolu. sendi viajn ideojn pri tio al *blinduloj@ Esperanto.de*

**Werner Groen, Gradimir Kragic, Heinz Peter Engels kaj Oleg Shevkun**




# Kalendaro

## Februaro – Aŭtuno 2024

**10. Februaro ĝis aŭtuno 2024 en Herzberg, Germanio**
Ekspozicio: Otto Dix en la Unua Mondmilito "Mi tre forte esperas, ke baldaŭ estos paco." En kunlaboro kun la Otto-Dix Muzeo de la urbo Gera.

## Junio 2024

**14.- 26. Junio en Mielno, Pollando: 46-a Ĉebalta Esperantista Printempo.** Gliwice'a Filio de PEA invitas al 46-a tradicia esperantista renkontiĝo ĉe Balta Maro. Informoj ĉe *stanislaw.mandrak(ĉe)gmail.com*

**15. - 23. Junio en Pobierowo, Pollando: BEMI-semajno ĉe la Balta Maro.** BEMI invitas ĉiujn ŝatantojn de biciklado al evento kun biciklaj ekskursoj, taŭgaj por ĉiu nivelo. Pliaj informoj kaj aliĝilo: *https://bemi.tejo.org/semajno2024/.*

**29. Junio – 7. Julio en Roskilde, Danlando. Roskilde Festivalo 2024.** Grandega muzika festivalo kun teamo de esperantistoj-volontuloj. Informoj ĉe: *https:// roskildefestivalo.wordpress.com/*

## Julio 2024

**10. - 14. Julio en Tartu, Estonio: 58-a Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-58 ).** Informoj ĉe: *https://www.facebook.com/ events/s/baltiaj-esperanto-tagoj-58 tar/342611521746739*

## Aŭgusto 2024

**03. - 10. Aŭgusto 2024 en Arusha, Tanzanio. 109-a Universala Esperanto Kongreso.** Informoj kaj aliĝo ĉe *https://uea.org/kongresoj/ UK/2024*

**03. - 10. Aŭgusto 2024 en Vác, Hungario. 73-a Kongreso de KELI.**
Kristana Kongreso 2024. Informoj ĉe: http://keli.chez.com/ tekstoj/2024.kongresa.alighilo.plus.pdf

**18. - 25. Aŭgusto 2024 en Šventoji, Litovio. Internacia Junulara Kongreso (IJK) 2024.** Informoj ĉe: *https://ijk2024. tejo.org/ijk-2024*

**23. - 27. Aŭgusto 2024 en Berlino, Germanio. 8-a ABELO** (Apud-Berlina Esperanta LudadO). Semajnfina renkontiĝo por ludemuloj. Informoj ĉe:*https://abeloabeloabelo. wordpress.com/*

**24. - 31. Aŭgusto 2024 en Montecatini Terme, Italio. 90-a Itala Kongreso de Esperanto.** Informoj ĉe: *https://kongreso. esperanto.it/90/*

## Septembro 2024

**20. - 22. Septembro 2024 en Hasselt, Belgio. Beneluksa Kongreso 2024.** Informoj: *https://olijslagers.info/LEA/*

## Oktobro 2024

**20. - 25. Oktobro 2024 en Arnsberg, Germanio. 12-a Esperantista Migrado Aŭtuna** (EMA 2024). Informoj ĉe: *https://www.esperanto.de/eo/enhavo/sperti/esperanto-aran%C4%9Doj-en-germanio*

**26. Oktobro 2024, 18h en Aalen: Alena Esperanto-Kulturpremio por Kjara** – aliĝu per *fame2024@esperanto-aalen.de*.


## Decembro 2024 – Januaro 2025

**28. Dec. 2024 – 03. Jan. 2025 en Bielefeld, Germanio. La silvestra renkontiĝo de la Germana Esperanto-Asocio.** Informoj: *www.esperanto.de/de/luminesk*.






Anzeige




www.primas-software-international.com

**Kisu min veka!**


Es
per
anto
psi 2024
Pier Luigi Simari
(IT)